

**INTRODUCTION TO EPISODE FOURTEEN**

TEACHER: Hello! It's now time to introduce other forms of the verb, the participles. The participles exist in two forms: active and passive, and in three times; past, present and future.

Notice the letter i: manĝinta is a participle which relates to the past (-is) tense of the verb; manĝanta is a participle which relates to the present (-as) tense; and manĝonta, because of the "o" letter, relates to the future (-os) tense. They are active participles.

Passive participles are similar, without the letter "n"; manĝita - manĝata - manĝota.

Participles are often used as adjectives. It's possible to speak, for example, of a written book (a book which was written); of a city about-to- be- visited (a city, which will one will visit); about a beer being made (a beer, which someone is now making). Try to find examples in the dialogues!

Participles help us express ourselves more concisely. That is specially true of adverbial participles. We can say, for example:

When I studied Esperanto, I learned a lot.

However, we can say that more concisely adverbially: Having studied Esperanto, I learned a lot.

Similarly: When I study Esperanto, I listen to music.

More concisely: While studying Esperanto, I listen to music.

Later you will read detailed explanations of participles. You'll learn and digest everything tranquilly. Yes, tranquilly - but for the Bonvolo family nothing is tranquil. Oh, poor Georgo; what will happen to him? So to find out, watch, listen and enjoy!

**ENKONDUKO AL EPIZODO DEKKVAR**

INSTRUISTO: Saluton! Jam estas tempo enkonduki aliajn formojn de la verbo, la participojn. La participoj ekzistas en du formoj, aktiva kaj pasiva, kaj en tri tempoj; estinta, estanta kaj estonta.

Do rimarku la literon i: manĝinta estas participo, kiu rilatas al la is-tempo de la verbo; manĝanta estas participo, kiu rilatas al la as-tempo; kaj manĝonta, pro la o-litero rilatas al la os-tempo. Ili estas aktivaj participoj.

Pasivaj participoj similas al la aktivaj, sen la litero "n"; manĝita - manĝata - manĝota.

Ofte ni uzas participojn kiel adjektivojn. Eblas paroli, ekzemple, pri libro verkita (libro, kiun oni verkis); pri urbo vizitota (urbo, kiun iu vizitos), pri biero farata (biero, kiun oni nun faras). Provu trovi ekzemplojn en la dialogaro!

Participoj helpas al ni pli koncize esprimi nin. Tio rilatas aparte al adverbaj participoj. Ni povas diri, ekzemple:

Kiam mi studis Esperanton, mi multon lernis.

Tamen - pli koncize ni povas adverbe diri:  
Studinte Esperanton, mi multon lernis.

Same:

Kiam mi studas Esperanton, mi aŭskultas muzikon.

Pli koncize: Studante Esperanton, mi aŭskultas muzikon.

Detalajn klarigojn pri participoj vi legos poste - vi lernos ĉion trankvile legi kaj digesti. Trankvile, jes... tamen por la familio Bonvolo nenio trankvilas. Ho, kompatinda Georgo: kio okazos al li? Do por ekscii rigardu, aŭskultu kaj ĝuu!

*SCENO 1 (PARKO)*

GEORGO Ho, eskapinta! Ho . . . tiel kuradi . . . tio inspiras filon . . . sed senspirigas filozofon. Sed . . . ve! Pri granda monsumo parolis la impostisto . . . do kion fari? Filisa scios, kio farendas. Do mi iros al ŝi . . . al la kafejo!

*SCENO 2 (ALIA LOKO EN PARKO)*

AZIZ Pardonon, sinjorino ... kio okazis al vi? Ĉu vi bezonas helpon?

HELENA Ne, ne. Nur ke mi vidis ion strangan ... nekompreneblan...kvazaŭ fantoman.

AZIZ Nu, sinjorino ... eble vi bezonas ripozon, ion por trinki ... Venu kun mi al la kafejo.

*SCENO 3 (HEJMO)*

KARLO Mi ne komprenas. Unue mia patro . . . poste Helena . . . kial ili estas forkurintaj? Kaj kien?

NINA Jes. Kaj kial li strange salutis nin, dirante . . . ĉu ne? . . . geprezidantoj?

KARLO Mia patro, kara Nina, estas granda mistero . . . mistero al ni kaj al si mem. Pro tio li estas filozofo . . . ĉiam esplorante, ĉiam demandante.

NINA Prave. Kaj neniam respondon trovante.

FILSA Ho . . . Jen la gastoj . . .

KARLO Saluton, pan . . .

- NINA Saluton, estimata sinjorino. Vidu . . . ni estas du vojaĝantoj . . . du serĉantoj de saĝeco kaj scioj . . . kiuj, estante membroj de la pasporta servo, esperas pasigi kelkajn noktojn sub via nobla kaj gastama tegmento.
- FILISA Kiaj ĝentilaj homoj . . .
- NINA Kompreneble . . . se nia ĉeesto eĉ iomete ĝenos vin, ni tuj retiriĝos . . . kiel kameloj rajdotaj...
- KARLO Kio . . . ?
- NINA Silentu . . . !
- FILISA Ne . . . vi restu! Esperantistoj kaj aparte membroj de la pasporta servo . . . ĉiam bonvenas ĉe ni. Kaj fakte . . . vi havas bonŝancon . . . ĉar ankoraŭ ne revenis nia filo kun lia . . . amikino . . .
- NINA Ĉu vere? Amikino . . . ?
- FILISA Nu . . . inter ni . . . mia edzo kaj mi esperas, ke ili baldaŭ estos gefianĉiĝintaj . . .
- KARLO Be . . . !
- FILISA Jes. Ŝi estas ĉarma knabino . . . tamen se ili estus revenintaj, ne estus spaco por vi. Do . . . bonvenon!

**SCENO 4 (PARKO)**

- BARDO Ho, ŝafo . . . ŝafo! Mia kuzo Ruselo diris, ke ŝi estas bela . . . belega . . . sed tiel mirinda . . . tiel mirakla . . . ho! Ŝi preterpasas . . . ĉiel, ĉiel tion, kion mi imagis pri ŝi.
- Jes, amiko mia. Prave vi riproĉas min. Kial mi forkuris? Ve . . . ! Ruselo estus sciinta, kio farendos. Ruselo . . . nu . . . li komprenas virinojn . . .
- Jes, jes . . . ankaŭ ŝafojn li komprenas. Kaj . . . kvankam ankaŭ mi komprenas ŝafojn . . . bedaŭrinde virinoj restas mistero . . . enigmo. La plej granda en la mondo.
- Kio . . . ? Jes, amiko mia. Vi pravas, muzikon mi komprenas . . . kaj eble mi povos komuniki al ŝi per muziko, per kanzono, kion mi sendube ne povas komuniki per vortoj. Ho . . . la aero estas vibranta . . . en la oreloj sonas kanzono . . . Ho, kiel ŝi ravas - inspiras min! Helena!

**SCENO 5 (KAFEJO ZAMENHOF)**

- HELENA Ĉu mi estas sonĝinta . . . ? Ĉu mi vere vidis ŝafiston? Kaj kien li forkuris?
- AZIZ Trankviliĝu, mi petas. Kie estas la kelnero?  
Ho! Finfine . . . ! Venas la kelnero . . . atendas klientoj, sinjoro!
- DETEKTIVO Ve! La prezidanto kun Helena! Eble ŝi misuzis partupon . . . forgesante, ke adverba partupon ĉiam rilatas al la subjekto . . .
- AZIZ Sinjoro! La fraŭlino maltrankviliĝas . . .
- DETEKTIVO Jes . . . misuzi partupon estas ja grava eraro. Kial oni ĉiam misuzas lingvon, kiam ĉeestas akademiano? Mi povas certigi al vi, via moŝta prezidanto . . .
- AZIZ Denove! Kial la tuta mondo paroladas pri prezidantoj . . . ?
- DETEKTIVO . . . ke fraŭlino Helena perfekte partuponas . . . senrivale regas Esperanton . . . fakte Esperantologion ŝi studis ĉe renoma universitato . . . kaj diplomon akiris . . .
- AZIZ Jes, tre interese. Sed simple alportu trinkaĵon.

- DETEKTIVO Kiu . . . mi?
- AZIZ Nu . . . Vi estas ja kelnero . . .
- DETEKTIVO Jen la tubero . . .
- AZIZ Tub-ero? Mi vidas nek tubojn nek erojn da tuboj . . .
- DETEKTIVO Kio . . . ? Akademiano . . . komprenante eĉ ne simplan Esperantan esprimon . . . ege suspektindas. Aŭ eble ne . . . oni ne multe atendu de la akademio. Sinjoro . . . via moŝta prezidanto . . . vi emas ŝerci. Parolante pri tuberoj, mi . . .
- AZIZ Ŝerci . . . ? Impostistoj neniam faras tion . . . neniam! Alportu trinkaĵon . . . tuj!
- DETEKTIVO Momenton . . . sciu, ne nur Helena suferas. Ankaŭ mi. Ne pro participoj . . . foje pro akuzativoj . . . certe pro georgozo . . .
- AZIZ Kio . . . ?
- DETEKTIVO Jes . . . georgozo . . .
- AZIZ Frenezulo! Frivolulo! Fripono! For . . . for . . . antaŭ ol mi faras el vi kelnero-supon. For!
- HELENA Ve . . . ! Kio pri la ŝafisto . . . kie estas la ŝafisto?

**SCENO 6 (HEJMO)**

- FILISA Nu . . . divenu kiu aperis lastatempe en nia kafejo?
- NINA Mi tute ne povas imagi, estimata kaj gastama sinjorino.
- KARLO Be - la fama profesoro John Wells . . .
- FILISA Prave! Sed kiel vi scias?
- KARLO Nu. . . tio estas . . .
- NINA Sendube . . . vi legis pri lia vizito en la UEA-revuo *Esperanto* . . . aŭ eble . . . en *Monato* . . .
- KARLO Jes . . . prave . . . mi legis . . .
- FILISA Do bone . . . sed kiu krome aperis?!
- NINA Mi ne scias. La poetino Eli Urbanová . . .
- FILISA Ne, ne . . .
- KARLO La romanisto Claude Piron . . .
- FILISA Ne, ne, ne. Vi neniam divenos. Do . . . mi diros. Venis al ni la prezidanto de la Akademio de Esperanto.
- KARLO / NINA La prezidanto . . . ?
- FILISA Sendube por peti . . . insisti . . . ke Georgo fariĝu akademiano. Parenteze . . . Georgo . . . kie li kaŝas sin . . . ?
- KARLO Ho . . . li for . . .

- NINA ... estas. Certe ... li forestas. Ni ne vidis lin ... flaris eĉ ne la plej etan parfumon de lia sankta estaĵo.
- FILISA Strange ... ho, ve! Jen vi ... dum horduono vi jam gastas ĉe mi ... babilante ... kaj mi proponis al vi nenion ... eĉ ne refreŝigaĵojn.
- NINA Ne gravas, kara kaj eminenta sinjorino ...
- FILISA Male ... ege gravas. Do ... vi ripozu iomete ... dum mi preparos teon kun freŝa mento de la ĝardeno.
- NINA Stultulo! Vi preskaŭ perfidis nin ... dirante, ke vi scias, ke venis profesoro Wells ... ke via patro forkuris ...
- KARLO Be ... kiu perfidas kiun? Ni perfidas mian patrinon. Kaj kio pri viaj sensencaĵoj? La parfumon de lia sankta estaĵo ... ' Jen farso ... stulta burlesko ... kaj mi ne plu ludemas.
- NINA Ts, ts, Karlo. Ĝi amuzas min. Kaj mi lernas pri viaj familianoj!
- JOLANDA Nekredeble! Mia frato ... kaj Nina! Sed ... kial vi tiel vestis vin ... ?

**SCENO 7 (KAFEJO ZAMENHOF)**

- HELENA Nu, mi sentas min pli bone. Dankon, sinjoro, pro via helpo.
- GEORGO A! He! Kio ... ? Ve ... ! La malamiko ... la impostisto ... kun mia filino! Evidente ... li kaptis ŝin ... kaj fie trinkigas al ŝi ... kion? Venenon! Ho ... la senkuraĝulo, implikante la filinon, kaj indulgante la patron.  
Helena! Ne malesperu! Jen via patro ... vin savonta!
- AZIZ Finfine ... mi trovis la eskapinton ... la ŝuldanton ... vi estas kaptita!
- HELENA Ve!
- GEORGO A! He! Kio ... ?
- HELENA Mi mortigis lin!

**SCENO 8 (HEJMO)**

- NINA Do ... jes. Ĉirkaŭkurante la mondon, ni trovis ĉie ... dank' al la pasporta servo ... amikecon kaj gastamon.
- JOLANDA Jes. Sed kial la ruzo ... la ŝejkaj vestaĵoj?
- KARLO Jes ... klarigu!
- NINA Do ... mi volis simple ... por la lasta fojo ... pruvi la gastamon de esperantistoj.
- KARLO Be ... kaj nun vi ja pruvis. Do mi ne plu partoprenas tiun ĉi pantomimon. Mi iras kuri ...
- JOLANDA Kio ... ? Ĉu vi kuros ... portante arabajn vestaĵojn?
- KARLO Be ... ne ... tio estas ... ne eblas kuri ... kiel arabo ... kiel ŝejko ... jen ... multe pli bone ...
- NINA Ho ... jen nia Karlo ... ne plu ŝejka ... sed certe ŝika ...
- KARLO Be! Mi eskapu! Mi kuru! Unu ... du ... tri ...

JOLANDA Kaj kio pri vi? Ĉu ankaŭ vi demetos viajn novajn vestaĵojn?

NINA Ne. Mi kredas, ke ne. Ĉar . . . plaĉas al mi mia nova rolo. Kaj fakte . . . ĉar Karlo ŝajne ne tre interesiga pri mi . . . ekĝermas ĉe mi ideo . . .

**SCENO 9 (KAFEJO ZAMENHOF)**

HELENA Vane . . . ho, vane, paĉjo. Mi mortigis lin . . .

GEORGO Hmm . . . impostiston eviti estas unu afero . . . impostiston mortigi estas alia. Tamen . . . el filozofia vidpunkto . . .

HELENA Paĉjo! Ne estas tempo por filozofio . . .

GEORGO A! He! Kio . . . ? Nu . . . eble ne. Sed . . . el financa vidpunkto, do - mortinta impostisto . . . neniuj impostoj . . .

HELENA Filozofio . . . financoj . . . pri ambaŭ mi fajfas. Jen kadavro . . .

GEORGO A! He! Kio . . . ?

HELENA Jen . . . sub la nazo . . . ho! Mi senesperas . . . ! Kadavro, kiun vi vane provis revivigi . . . kadavro forigenda . . .

GEORGO Forigenda . . . nu! Ni iru en la parkon kaj fosu truon . . .

HELENA Frenezaĵo . . . ! Estas tiom da homoj en la parko . . .

GEORGO Des pli bone. Ili helpu . . .

HELENA Paĉjo! Iru kaj telefonu al panjo. Ŝi scios, kio farendas. Iru tuj!

**SCENO 10 (HEJMO)**

FILISA Jen . . . por miaj gastoj el foraj landoj. Sed . . . kie estas via ĉarma kunulo . . . ?

NINA Ho . . . li forkuris . . . tio estas . . . li bezonis freŝan aeron.

FILISA Ĉu? Estas interese, ke . . . laŭvizaĝe . . . laŭvoĉe . . . li forte memorigas min pri mia filo Karlo.

FILISA Ho . . . pardonon. Sendube iu de la Esperanto-klubo. Plej verŝajne Georgo forgesis pagi nian jarkotizon . . . Al ĉi? Kiu . . . ? Finfine, Georgo . . . jam de horoj ni serĉas vin . . . kio? Krizo? Ĉe vi konstante krizas . . . kio? Ĉu renkontiĝi . . . ĉe la kafejo? Georgo . . . Georgo?! Ho, ve...

FILISA Pardonu min . . . mi tuj revenos. Sed intertempe . . . trinku . . . manĝu . . . sentu vin kiel hejme. Ho, ve. Filozofoj . . . !

**SCENO 11 (KAFEJO ZAMENHOF)**

HELENA Certe mi ne intencis vundi lin . . . certe ne intencis mortigi lin ĉar kial ataki homon, kiu helpis min? Monstro mi estas . . . vera monstro, kiu helpinton mortigis. Do . . . mi iros al la polico. kaj konfesos, kion mi faraĉis...espereble ili kompatos...pardonos min. Mi nur volis protekti mian patron.

*SCENO 12 (EKSTER KAFEJO)*

BARDO

Gitaron ludante, ĝoje kantante,  
La mondon travagis mi,  
Sed vin ekvidante, amon spertante,  
Resti mi volas kun vi.

Mi ne estas riĉa, sed plene feliĉa,  
Se brilas la sun' orkolora;  
Sed eĉ pli kontenta kaj – jes – elokventa,  
Se sonas muziko ankora.

Gitaron ludante, ĝoje kantante,  
La mondon travagis mi,  
Sed vin ekvidante, amon spertante,  
Resti mi volas kun vi.

HELENA Kio? La ŝafisto . . . Bardo . . . ĉu li amas min? Ve . . . li amas murdinton!

Dividu kun mi, do, en amo kaj fido,  
Muzikon, magion, mielon;  
Do kune agorde, perfekte akorde,  
Ni kreu surteran ĉielon.

*SCENO 13 (PARKO)*

HELENA Ne! Neeble . . . ! Por mi . . . murdinto . . . ne plu eblas ami . . . kaj ne ami estas mia puno . . .  
ho, mi . . . mizerulo . . . la plej mizera mizerulo en la mondo.

BARDO

Gitaron ludante, ĝoje kantante,  
La mondon travagu ni,  
Ĉar vin ekvidante, amon spertante,  
Resti mi devas kun vi.

BARDO Ho . . . kiel miraklas muziko!

DETEKTIVO Kio . . . ? La ŝafaĉo . . . ! Mi abomenas tiun beston . . . mi erigos . . . boligos . . . stufos ĝin kaj  
servos ĝin al klientoj en la kafejo . . .

BARDO Kaj nun . . . al ŝi! Al ŝi, kiun mi amas . . . al Helena . . . al ŝi, kiu, aŭdinte mian kanzonon, cedos  
al la kanonoj de mia amo. Do . . . Helena . . . al vi mi impetas!

DETEKTIVO Interese. La ulo bone kantas . . . do eble rivalo. Povas esti, ke klientoj ĉe Kafejo Zamenhof  
preferos la voĉon de tiu ĉi bubo ol la mian . . .mian belan, profundan bason kaj do . . . eble oni  
elpostenigos min . . . tiam mi estos nek kantanta kelnero nek dubanta detektivo . . . tiam mi  
estos neniu . . . neniam nenie neniel nenial neniom nenio . . .

BARDO Aaaaaaaaaaah . . . !

DETEKTIVO Aah! Kio estas tio . . . ?

BARDO Ho . . . ŝafo, ŝafo . . . kia terurajo! Ni fuĝu . . . ! For de tiu ĉi malbenita kafejo . . .

*SCENO 14 (KAFEJO ZAMENHOF)*

DETEKTIVO Kadavro! Nekredeble . . . ! Mirinde! Jen kadavro, kaj kadavro bezonas krimon . . . krimo  
bezonas detektivon . . . kaj do . . . tio signifas . . . ke mia sorto ne estu kelnera, sed detektiva!  
Kara kadavro . . . mi povus kisi vin . . . uh, ne . . . cenzuristoj ĉieas . . . ni pensu pri la publiko  
. . . sed feliĉe! Mi denove scias, kiu...kio...mi estas ...detektivo! Kaj pli grave, mi scias, kiu  
krimis. Estu arestita . . . la ŝafisto!

JOLANDA Sinjoro! Sinjoro! Kio okazis?

AZIZ Hu . . . he . . . mia kapo . . .

JOLANDA Trankvile, trankvile, sinjoro . . . ne tro moviĝu . . .

AZIZ Ve . . . ! Mi mortis . . . mi estas en ĉielo ... jes . . . vi estas anĝelo . . .

JOLANDA Kio ... ? Anĝelo ...? Mi tute ne estas anĝelo! Mi estas Jolanda ... juĝisto ... kaj vi estas en ...

AZIZ Paradizo . . . jes . . . la anĝeloj juĝis min . . . juĝis min inda je paradizo. Vidu . . . eĉ impostistoj povas eniri ĉielan paradizon . . .



*CONCLUSION TO EPISODE FOURTEEN*

TEACHER: Just imagine! The waiter, finding a corpse, thinks that he is indeed a detective; and Mr. Aziz, finding Jolanda, thinks that he is in paradise. Hopefully you won't think you're in "unparadise", hearing so many participles. The more you hear or read participles, the more skillfully you'll use them yourselves.

Let's analyze: Aziz says to Helena, "you will have calmed down a bit. (You) will have drunk something." Will have calmed down ... will have drunk something. The participles describe Helena's future state. Helena will sometime in the future have calmed down. Similarly, sometime in the future, she will have drunk something.

So the participle describes what she did, while the auxiliary verb "esti" indicates when she did it. This principle is valid for all adjectival participles.

You noticed also adverbial participles; Karlo says, "My father...always exploring, always questioning." And Nina replies "True. And never finding an answer."

Well, that's enough - at least for me - about grammar. It is wiser to read the notes in the companion booklet and do the exercises.

Don't be upset if you don't immediately understand. The more you practice, the more competent you will become. So now, on to the exercises!

And we will meet again in the next lesson to finally learn what will happen to the Bonvolo Family. So until next time, see you!

**KONKLUDO AL EPIZODO DEKKVAR**

INSTRUISTO: Imagu, do! La kelnero, trovante kadavron, opinias, ke li estas ja detektivo; kaj s-ro Aziz, trovante Jolanda, opinias, ke li estas en paradizo. Espereble vi ne opinias vin en malparadizo, aŭdante tiom da participoj. Ju pli vi aŭdas aŭ legas participojn, des pli lerte vi mem ilin uzos.

Ni analizu. Aziz diras al Helena, "...vi estos iomete trankviliĝinta...estos ion trinkinta."

Estos trankviliĝinta . . . estos trinkinta. La participoj priskribas la estontan staton de Helena. Helena estos iam en la estonto trankviliĝinta. Same - iam en la estonto - ŝi estos ion trinkinta. Do la participo priskribas, kion ŝi faris, - dum la tempo de la helpverbo "esti"-- indikas, kiam ŝi faris ion. Tiu ĉi principo validas por ĉiuj adjektivaj participoj.

Vi rimarkis ankaŭ adverbajn participojn: Karlo diras, "Mia patro...ĉiam esplorante, ĉiam demandante." Kaj Nina respondas "Prave. Kaj neniam respondon trovante ."

Nu... pri gramatiko almenaŭ miaflanke sufiĉas. Pli saĝe estas legi la notojn en la akompana libreto kaj fari la ekzercojn. Ne maltrankviliĝu, se vi ne tuj komprenas. Ju pli vi ekzercos vin, des pli vi kompetentos. Do nun ek al la ekzercoj!

Kaj ni revidos nin en la venonta leciono por finfine ekscii, kio okazos al la Bonvolanoj. Do ĝis la venonta fojo . . . ĝis!